

Eksperimenta havigo de metriko en ĝenerala relativeco

A.F.F. Teixeira *

Centro Brasileiro de Pesquisas Físicas
22290-180 Rio de Janeiro-RJ, Brazilo

10an de Majo de 2005

Abstract

Ŝajne estas malmulte konata ke la metrikoj de ĝenerala relativeco ($\hat{\text{GR}}$) povas esti havataj sen integri Einstein-ajn ekvaciojn. Por tio, ni bezonas difini nur unuon por $\hat{\text{GR}}$ -intertempo Δs , kaj observi 10 geodezojn (el kiuj, almenaŭ unu devas esti nenulan). Eĉ sen uzi iun unuon, ni povas havi $\kappa g_{\mu\nu}(x^\rho)$, kie $\kappa = \text{konst.}$ Niaj notoj tentas simpligi artikolojn de E. Kretschmann (1917) kaj de H.A. Lorentz (1923) pri tiu lasta afero.

It seems to be not well known that the metrics of general relativity (GR) can be obtained without integrating Einstein equations. To that, we need define only unit for GR-interval Δs , and observe 10 geodesics (out of which at least one must be nonnull). Even without using any unit, we can have $\kappa g_{\mu\nu}(x^\rho)$, where $\kappa = \text{const.}$ Our notes attempt to simplify articles of E. Kretschmann (1917) and of H.A. Lorentz (1923) about this last subject. To have an English version of our notes in LaTeX, please ask the author by e-mail.

1 Antaŭparolo

Pensu pri finhava 3-spaco (via ĉambro, ekzemple), kaj finhava intertempo (unu minuto komencante nun, ekzemple). Tiu duopo estu nomata nia peco de spacotempo. Ni scivolas se ni povas findi la $\hat{\text{GR}}$ -a metrikon $g_{\mu\nu}(x^\rho)$ en nia peco de spacotempo, sen integri la ekvaciojn de Einstein por la vakua gravita kampo.

Komence, la $\hat{\text{GR}}$ proponas ke la 3-spaco de la ĉambro havu koordinatojn $\{x^i\}$, $i = 1..3$; tiuj koordinatoj estas ordinare kurbaj. Kaj proponas ke, en ĉiu punkto $\{x^i\}$ de la koordinatsistemo, estu fiksata horloĝo de koordinato, kiu montrus la fluon de la loka tempa koordinato x^0 . Rememoru ke la horloĝoj de koordinato de la $\hat{\text{GR}}$ ne bezonas esti samtempigataj, nek flui same, nek havi konstantan fluon; sed ĉiu horloĝo devas flui ĉiam pozitive, kaj najbaraj horloĝoj devas ĉiam montri najbarajn tempojn.

*teixeira@cbpf.br

Kiam nia peco de spacotempo jam havas koordinatojn $\{x^\mu\} = \{x^0; x^1, x^2, x^3\}$, ni ordinare skribas kaj solvas la ekvaciojn de Einstein, kaj havigas la 10 komponantojn $g_{\mu\nu}(x^\rho)$ de la metrika tensoro. Sed ni scivolas se estas ebla, ke ni havigus $g_{\mu\nu}(x^\rho)$ sen solvi tiujn (alte komplikajn) ekvaciojn.

La respondo estas jes. En sekcio 2 ni difinos unuon de tempo kaj de longo; tiuj unuoj estos uzataj por eksperimente havigi la metrikajn komponantojn. En sekcioj 3 kaj 4 ni vidos ke, eĉ sen uzi tiuj unuoj, ni eksperimente povas havigi $\kappa g_{\mu\nu}(x^\rho)$, kun κ =iu nekonata konstanto.

2 Sekundo, velo c , metro, kaj la $g_{\mu\nu}$ 'j

Nuntempe, *sekundo* (unu de propra intertempo τ) estas difinata [1] kiel la daŭro de 9.192.631.770 periodoj de la lumo ... inter la du niveloj ... de la atomo de cesio-133. La *sekundo* estas difinata loke, apud la specimeno de la cesio; la difino estas valebla sub multaj kondiĉoj, kiel por iu ajn akcelo de la specimeno [2], kaj por iu ajn pozicio en la gravita kampo.

Ankaŭ estas difinata [3] ke la velo de la lumo en la vakuo estas $c:=299.792.458$ m/s. Sekve, estas difinata ke *metro* estas la longo ke la lumo trakuras en la vakuo dum $1/299.792.458$ de sekundo.

Por registri la fluon de la propra tempo (aŭ fizika tempo), atomikaj horloĝoj estas nuntempe uzataj; tiuj horloĝoj, konsiderataj modelaj, akompanas lineare la fluon de la *sekundoj*. Ni povas programi modelajn horloĝojn por montri la fluon de la produkto $c\tau$, anstataŭ de la propra tempo τ . Tiu programado estos utila, ĉar ni uzos nur la produkton $c\Delta\tau$ (anstataŭ c kaj $\Delta\tau$ malkune) en ĉi tiu artikolo.

Insistinde, la horloĝoj de koordinato en ĜR *ne* montras lineare la fluon de la fizika tempo, ordinare; ili montras nur la fluon de la loka tempa koordinato x^0 .

Posedante modelaj horloĝoj, ni nun eltrovos la metrikajn koeficientojn $g_{\mu\nu}$ en elekta evento E : en E , ni rimarkas la montrojn τ_α ($\alpha = 1..10$) de 10 modelaj horloĝoj; tiuj montroj povas esti malsimilaj, ĉiuj. Tuj, ni ekĵetas la 10 holoĝojn laŭ iu ajn direktoj, kun iu ajn veloj. Ne longtempe, ni rimarkas la okazaĵojn de la 10 horloĝoj en najbaraj eventoj $E + \Delta_\alpha E := \{x^\mu + \Delta_\alpha x^\mu\}$; en tiuj okazaĵoj ni rimarkas ankaŭ la montrojn $\tau_\alpha + \Delta\tau_\alpha$ de la modelaj horloĝoj. Ni skribas

$$c^2 \Delta\tau_\alpha^2 = g_{\mu\nu}(E) \Delta_\alpha x^\mu \Delta_\alpha x^\nu, \quad \alpha = 1..10, \quad (1)$$

kiuj estas 10 ekvacioj, linearaj kaj nehomogenaj, por la 10 nekonatoj $g_{\mu\nu}(E)$. Ni solvas tiujn ekvaciojn, kaj havigas la 10 nombrojn $g_{\mu\nu}(E)$. Notu en la (1) ke, se la modelaj horloĝoj montras la fluon de la produkto $c\tau$ anstataŭ de τ , tiuokaze la difino de nure *metro* estus sufiĉa por havigi la metrikon.

Anstataŭ uzi 10 horloĝojn, ni povus uzi nur $1 \leq n < 10$ horloĝojn, kaj plus $(10 - n)$ fotonojn (nulaĵn geodezojn, $ds^2 = 0$) kiuj ankaŭ pasus tra la evento E . Tiuokaze la ekvacioj estus

$$c^2 \Delta\tau_\alpha^2 = g_{\mu\nu}(E) \Delta_\alpha x^\mu \Delta_\alpha x^\nu, \quad \alpha = 1..n, \quad (2)$$

$$0 = g_{\mu\nu}(E) \Delta_\alpha x^\mu \Delta_\alpha x^\nu, \quad \alpha = n + 1..10. \quad (3)$$

Tiuj 10 linearaj ekvacioj (n nehomogenaj kaj $10 - n$ homogenaj) permesas havigi la 10 $g_{\mu\nu}(E)$.

Ni bezonus ripeti la procedon por *ĉiuj* eventoj de nia peco de spacotempo, por havi la metrikon $g_{\mu\nu}(x^\rho)$ en tiu peco; tial ke la nombro de eventoj estas nefinhava, tiu ripetado estas nur formala.

3 Havigo de $g_{\mu\nu}(x^\rho)/g_{\sigma\tau}(x^\rho)$

Eĉ sen uzi unuojn de tempo kaj de longo, ni povas multe scii pri la metrika funkcio $g_{\mu\nu}(x^\rho)$. Frue Kretschmann [4] montris kiel havigi $\kappa g_{\mu\nu}(x^\rho)$, kun $\kappa =$ iu ajn konstanto. Poste Lorentz [5] plibonigis la metodo de Kretschmann. Ĉi tie ni resumos la verkon de Lorentz, kun kelkaj modifoj.

Ni komence elektas eventon E , kaj serĉas infomojn pri la 10 nombroj $g_{\mu\nu}(E)$. En ŝtupoj de 1 al 3 ni havigos $\kappa g_{\mu\nu}(E)$, kun $\kappa =$ iu ajn konstanto.

Ŝtupo 1) Estu fotono kiu trapasas ambaŭ $E = \{x^\mu\}$ kaj la najbaran eventon $E_1 = E + \Delta_1 E$, kun $\Delta_1 E = \{\Delta_1 x^\mu\}$; estante $ds^2 = 0$ por fotonoj,

$$g_{\mu\nu}(E)\Delta_1 x^\mu \Delta_1 x^\nu = 0. \quad (4)$$

Tial ke la 4 nombroj $\Delta_1 x^\mu$ estas legataj el la koordinatoj, la (4) estas 1 homogenea lineara ekvacio por la 10 nekonataj nombroj $g_{\mu\nu}(E)$, kun konataj koeficientoj.

Estu 8 aliaj fotonoj ($i = 2..9$) elektataj hazarde, sed kiuj ankaŭ trapasas E ; elektu 8 eventojn $E_2..E_9$, najbarajn al E , sur la vojo de la 8 fotonoj; skribu 8 novajn ekvaciojn, linearajn kaj homogenajn, por la 10 nekonataj $g_{\mu\nu}(E)$.

Ŝtupo 2) La aro de la 9 homogenaj linearaj ekvacioj

$$g_{\mu\nu}(E)\Delta_i x^\mu \Delta_i x^\nu = 0, \quad i = 1..9 \quad (5)$$

donas la valoron de 9 sendependajn raciojn $g_{\mu\nu}(E)/g_{\sigma\tau}(E)$ inter la 10 nombroj $g_{\mu\nu}(E)$. Estus malutile, uzi plus unu fotonon por havi novan ekvacion kiun, kune kun la jamaj 9, permesus havigi la 10 nombrojn $g_{\mu\nu}(E)$; tiu nova ekvacio por la $g_{\mu\nu}(E)$ 'j estus denove homogenea, kaj estus dependa de la aliaj ekvacioj.

Ŝtupo 3) Ni elektas 10 nombrojn $\kappa^{\sigma\tau} = \kappa^{\tau\sigma}$ kaj difinas

$$e^{2w(E)} := \kappa^{\sigma\tau} g_{\sigma\tau}(E), \quad h_{\mu\nu}(E) := e^{-2w(E)} g_{\mu\nu}(E) : \quad (6)$$

la nombro $w(E)$ ne estas konata, sed la 10 nombroj $h_{\mu\nu}(E)$ estas ĉiuj konataj.

Ŝtupo 4) Ni ripetas la ŝtupojn 1..3 por *ĉiuj* aliaj eventoj de nia peco de spacotempo, kaj difinas

$$e^{2w(x^\rho)} := \kappa^{\sigma\tau} g_{\sigma\tau}(x^\rho), \quad h_{\mu\nu}(x^\rho) := e^{-2w(x^\rho)} g_{\mu\nu}(x^\rho); \quad (7)$$

la funkcio $w(x^\rho)$ ne estas konata, sed la 10 funkcioj $h_{\mu\nu}(x^\rho)$ estas ĉiuj konataj. Denove, ial ke la nombro de eventoj estas nefinhava, tiu ripetado estas nur formala. Rimarku ke la funkcioj $h_{\mu\nu}(x^\rho)$ estis fiksataj per la 10 nombroj $\kappa^{\sigma\tau}$. Havante la funkcioj $h_{\mu\nu}(x^\rho)$, ni kalkulas la 40 partajn derivaĵojn $h_{\mu\nu,\lambda}(x^\rho)$, kiuj estos baldaŭ uzataj.

Ni ankoraŭ bezonas koni la funkcion $w(x^\rho)$ por fine havigi la 10 metrikajn funkciojn $g_{\mu\nu}(x^\rho)$. Por tio, Kretschmann kaj Lorentz pensis pri geodezaj movoj de partikloj ($ds^2 \neq 0$), kiuj ni nun vidos.

4 $w(x^\rho)$ krom obla konstanto

Estu $\{x^\mu\}$ kaj $\{x^\mu + \Delta x^\mu\}$ du najbaraj eventoj, ambaŭ ĉe geodezo de unu partiklo. La movo de la partiklo obeas

$$\frac{\Delta^2 x^\mu}{\Delta s^2} + \{\nu\rho\}^\mu \frac{\Delta x^\nu}{\Delta s} \frac{\Delta x^\rho}{\Delta s} = 0. \quad (8)$$

Ordinare, la metriko $g_{\mu\nu}(x^\rho)$ uzata en la (8) estas konata, kaj la ekvacio donas la movon $x^\mu(s)$ de la partiklo. Ĉi tie, tamen, ni uzos la (8) aliacele. En la 4 ekvacioj (8) ni povas noti la Δx^μ , sed ni ne konas nek Δs (tial ke ni ne uzas unuon de propratempo) nek la simbolojn de Christoffel de dua tipo $\{\nu\rho\}^\mu$ (tial ke ni ne havas nek la funkciojn $g_{\mu\nu}(x^\sigma)$ nek ĝiajn derivaĵojn $g_{\mu\nu,\rho}(x^\sigma)$). Do la (8) estos uzata ne kiel ordinare, sed jes por doni informojn pri la metriko.

Efektive, laŭlonge la geodezo ni havas la nombrojn

$$\Delta\sigma^2 := h_{\mu\nu}(x^\rho)\Delta x^\mu\Delta x^\nu, \quad (9)$$

tial ke ni havas la $h_{\mu\nu}(x^\rho)$ kaj ni povas noti la Δx^μ 's. Do ni povas havi, laŭlonge la geodeza movo, la kvantojn $\Delta x^\mu/\Delta\sigma$ kaj $\Delta^2 x^\mu/\Delta\sigma^2$; tiuj estos uzataj en la (8), kun iu modifo.

Komencu de (8) kaj de (9), kaj uzu

$$\Delta s = e^w \Delta\sigma, \quad g^{\mu\nu} =: e^{-2w} h^{\mu\nu}, \quad h^{\mu\nu} h_{\nu\rho} = \delta_\rho^\mu, \quad (10)$$

$$h_{\mu\nu} \frac{\Delta x^\mu}{\Delta\sigma} \frac{\Delta x^\nu}{\Delta\sigma} = 1, \quad \frac{\Delta w}{\Delta\sigma} = \frac{\Delta x^\mu}{\Delta\sigma} w_{,\mu}, \quad (11)$$

$$\{\nu\rho\}^\mu g = \{\nu\rho\}^\mu h + \delta_\nu^\mu w_{,\rho} + \delta_\rho^\mu w_{,\nu} - h^{\mu\alpha} h_{\nu\rho} w_{,\alpha}, \quad (12)$$

por ŝanĝi la (8) al

$$\left(h^{\mu\alpha} - \frac{\Delta x^\mu}{\Delta\sigma} \frac{\Delta x^\alpha}{\Delta\sigma} \right) w_{,\alpha} = \frac{\Delta^2 x^\mu}{\Delta\sigma^2} + \{\nu\rho\}^\mu h \frac{\Delta x^\nu}{\Delta\sigma} \frac{\Delta x^\rho}{\Delta\sigma}. \quad (13)$$

En nia peco de spacotempo, elektu geodezo de partiklo, kaj evento E en tiu geodezo. Ĉiu kvanto de la (13) aludas tiun eventon kaj tiun geodezon. Nur la 4 nombroj $w_{,\alpha}(E)$ estas nekonataj, kaj la (13) estas 4 algebraj ekvacioj, linearaj kaj nehomogenaj, por tiuj nombroj. Tamen, havigi la solvon de la 4 $w_{,\alpha}(E)$ ne estas tiel simpla. Ni vidu kial. [Ĉi tie nia metodo malproksimiĝas al la metodo de Lorentz.]

Difinu la kvadratan matricon M per ĝiaj komponantoj

$$M^{\mu\alpha} := h^{\mu\alpha} - u^\mu u^\alpha, \quad u^\mu := \frac{\Delta x^\mu}{\Delta\sigma}, \quad (14)$$

kaj la vertikalan matricon U per

$$U^\mu := \frac{\Delta u^\mu}{\Delta\sigma} + \{\nu\rho\}^\mu h u^\nu u^\rho, \quad (15)$$

kaj reskribu la (13) kiel

$$M^{\mu\alpha} w_{,\alpha} = U^\mu. \quad (16)$$

Tial ke la matricio M havas determinanton nulan, ni ne povas inversi la (13) por havigi $w_{,\alpha}(E)$ simple kiel $(M^{-1})_{\alpha\mu}(E)U^\mu(E)$.

Tial ni elektas alian geodezon kiun ankaŭ trapasus la eventon E , sed kun nova velo $u'^\mu(E)$, hazarde elektata. Certe la nova ekvacio

$$M'^{\mu\alpha}w_{,\alpha} = U'^\mu \quad (17)$$

ankaŭ ne permesas findi $w_{,\alpha}(E)$, tial ke ankaŭ la matricio M' havas nulan determinanton. Tamen, iu lineara kombino de la ekvacioj (16) kaj (17), ekzemple la subtraho,

$$(M^{\mu\alpha} - M'^{\mu\alpha})w_{,\alpha} = U^\mu - U'^\mu, \quad (18)$$

permesas havigi la 4 diferencialojn $w_{,\alpha}$ je la evento E ,

$$w_{,\alpha} = ((M - M')^{-1})_{\alpha\mu} (U - U')^\mu, \quad (19)$$

tial ke la determinanto de la matricio $M - M'$ estos nenula.

Ni bezonas ripeti la kalkulon por ĉiuj eventoj de nia peco de spacotempo, por havi la 4 diferencialajn funkciojn $w_{,\alpha}(x^\mu)$ en la peco. Denove tiu ripetado estas nur formala, tial ke la kvanto de eventoj estas nefinhava. Pri integrado ni fine havigus la funkcio $w(x^\mu)$, sed kun unu nekonatan adician konstanton w_0 .

Por fini: Por havi la valoron de w_0 , uzu modelan horloĝon (prefere unu kiu montru la produkton $c\tau$). Fiksu tiu horloĝon apud iu ajn evento $\{x^\mu\}$ kaj komparu ĝia ritmon al la ritmo de la loka horloĝo de koordinato (kiu montras x^0); skribu

$$c\Delta\tau = e^{w(x^\mu)}\Delta x^0, \quad (20)$$

kaj elfindu la valoron de w_0 .

5 Komentoj kaj dankoj

Nia metodo por havigi $w_{,\alpha}(E)$, ekvacio (19), uzis nur 2 geodezojn ; do ĝi ŝajnas pli simpla ol la metodo de Lorentz [5], kiu uzis 10 geodezojn.

Konsideru la spacotempo kun koordinatoj $\{x^\mu\}$, metriko $h_{\mu\nu}$, elemento de intertempo $d\sigma$, kaj velo $u^\mu := dx^\mu/d\sigma$. En tiu spacotempo,

$$\frac{du^\mu}{d\sigma} + \{\nu\rho\}_h u^\nu u^\rho = a^\mu, \quad a^\mu := (h^{\mu\alpha} - u^\mu u^\alpha)w_{,\alpha} \quad (21)$$

estas ekvacio de movo de partiklo, ne geodeza, sed kun 'ekstera akcelo' a^μ . Rimarku ke $M^\mu{}_\nu := (h^{\mu\alpha} - u^\mu u^\alpha)h_{\alpha\nu}$ faras $M^\mu{}_\nu u^\nu = 0$, do ĝi projekcias vektorojn sur la hiperebena normala al la vektoro de velo u^μ . Do la (13) permesas havigi nur la komponenton de $w_{,\mu}$ normalan al u^μ , ne la tutan $w_{,\mu}$.

Ni kore dankas al la skipoj de Microsoft, PCTeX, Reta Vortaro [6], kaj arXiv.org, kiuj multe faciligis skribi kaj eldoni ĉi tiujn notojn.

References

- [1] C W Misner, K S Thorne, kaj J A Wheeler, *Gravitation*, Freeman (1973) paĝo 28; ankaŭ <http://www.answers.com/second>
- [2] H J Hay, J P Schiffer, T E Cranshaw, kaj P A Egelstaff, *Measurement of the red shift in an accelerated system using the Mössbauer effect in Fe^{57}* , Phys Rev Letters **4** (1960) 165-166
- [3] <http://www.answers.com/speed+of+light>
<http://scholar.google.com/scholar?q=speed+of+light>
- [4] E Kretschmann, *Über den physikalischen Sinn der Relativitätspostulate, A. Einsteins neue und seine ursprüngliche Relativitätstheorie*, Annalen der Physik **53**, 575-614 (1917); *Il significato fisico dei postulati della relatività, la nuova teoria della relatività di A. Einstein e la sua originaria*, <http://matsci.unipv.it/persons/antoci/re/Kretschmann17.pdf>
- [5] H A Lorentz, *The determination of the potentials in the general theory of relativity, with some remarks about the measurement of lengths and intervals of time and about the theories of Weyl and Eddington*, Proc. Acad. Amsterdam **29**, 383 (1923); Collected Papers of H.A. Lorentz - Volume V - Martinus Nijhoff - The Hague (1937) 363-382.
- [6] <http://www.uni-leipzig.de/esperanto/voko/revo/>